# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013

2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-03 sendita el Budapeŝto la 22an de januaro. Kontrolo el Benino.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## Saluto aperis en Esperanto

La novjara mesaĝo de la prezidanto de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj (CONGO)) aperis en kvar lingvoj, inkluzive de Esperanto. Por vidi tiun version, eniru la paĝon kaj iru ĝis la subo de la dokumento: http://ngocongo.org/wp-content/uploads/2021/01/CoNGO-President.2021.Message.MultiLanguage.pdf

La mesaĝo traktas la efikojn de la pandemio, kaj plie defendas la ĉiam pli minacatan rolon de la Neregistaraj Organizoj kaj civila socio en la regado de iuj landoj kaj la mondo. Tiuj agantoj ja kuraĝigas la pluralecon de opinioj; kvalito ne universale aprezata.

## Proponoj por la Kongresa Universitato (IKU) bonvenaj

La periodo por sendi proponojn por la Internacia Kongresa Universitato en Belfasto estis plilongigita. Resumon kaj biografieton bv. sendi al la IKU-sekretario (amri@huji.ac.il) ĝis la **31-a de januaro 2021**. La honorario estas € 260, duono dependas de ĝustatempa livero de teksto por la IKU-libro kaj duono – de fizikaj partopreno en la UK kaj okazigo de la prelego. Ĉar la kongreso estas planata kiel hibrida, fizika partopreno ne estas nepra kondiĉo. Ekzemplon de resumo eblas vidi en https://uea.org/teko/IKU.

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj Mirejo Grosjean



**ENHAVO**


- CONGO salutis
- Kongresa Universitato
- Unesko-Kuriero
- ILEI leteris pri kopirajto
- Indekso de AMO

# La Kuriero de Unesko honoras virinojn kaj radion

La nova numero de la Unesko-Kuriero (2020-01) estas senpage elŝutebla por membroj de UEA de la asocia retejo www.uea.org sub la rubriko ‘Revuoj’. La kuriero nun aperas en naŭ lingvoj – kompare kun ses kiam Esperanto estis aldonita en 2018. La revuo nun legeblas en la araba, ĉina, angla, Esperanto, franca, korea, portugala, rusa kaj hispana. Unesko bonvenigas partnerajn proponojn por aldoni pli da lingvoj. La ĉeftemo de la nuna numero estas ‘Radio: Pli forta kaj vigla ol antaŭe’. Jen la enkonduka alineo de S-ino Shiobhan McHugh (Aŭstralio) pri la temo: “Per disvolvo de sonrakontoj, la elsendo de podkastoj venigis pli ol novan vivospiron al la radio. En malmultaj jaroj ĝi fariĝis tutmonda industrio – kun reinventado de la aŭskultmaniero kaj per la ebligo de pli proksimaj ligoj kun la aŭskultantoj.”




Elvokivaj fotoj el naŭ landoj kaj jaroj figuras en raportaĵo ‘Povaj virinoj’ de Katarina Markelova. La fotoj estas de Nadia Ferroukhi kaj venas el Kenjo, Francio, Usono, Ĉinio, Komoroj, Meksiko, Gvineo-Bisaŭa, Estonio, Alĝerio kaj Indonezio. Plia artikolo aperigas intervjuon kun kazaĥaj filmfaristoj, kies filmo ‘Ayku’ estis premiita en la Fimfestivalo de Cannes en 2018.




Revuofine aperas artikolo pri la vivo kaj atingoj de la brita feministino, Emily Pankhurst.

Teamo de dediĉitaj Esperantistoj el multaj landoj liveras tradukojn al Esperanto el diversaj fontlingvoj. Eblas mendi fizikajn ekzemplerojn de ĈEL, nia ĉina Landa Asocio, kiu nun prizorgas la Esperantan version. Jarabono por kvar numeroj kostas 27 eŭrojn.

En tiu retejo de UEA aperis numeroj 2020-01 (priskribita supre) kaj 2020-02. La fakta elŝuto okazas de la retejo de Unesko, por ke ili povu nombri la elŝutojn. Atentu, numero 2020-02 pezas 16 MB, kaj numero 2020-01 ĉ. 10 MB. SMG povas kontrau peto liveri pli sveltan version de numero 2, je 7 MB.

SMG

## ILEI sendis formalan leteron al la japana kompanio

Nia instruista Lligo aldonis sian voĉon al la protesto de UEA kaj JEI pri la klopodo de japana kompanio registri nomon por nova retrevuo, kiu inkluzivas la vorton 'Esperanto'. La revuo ne havas rilaton kun la lingvo, kvankam simpatias kun ĝiaj celoj. La revuo ja temas pri transnacia harmonio kaj kunlaboro per la angla lingvo.

## La Unua Forumo por ILEI-gvidantoj

Mireille Grosjean (Mirejo Groĵan), kiel prezidanto de ILEI, opinias, ke Forumoj de ILEI-sekciestroj kaj reprezentantoj povus alporti novajn ideojn, interŝanĝojn de strategioj k.s.. Tio estis parte spronita pri la ege malforta stato de kelkaj el la sekcioj de la Ligo. La fortaj donu ideojn kaj helpojn al tiuj pli malfortaj. La unua tia Forumo okazos la 6-an de februaro 2021, ekde 15:00 UTC, pere de *Zoom*.

Ĉar temas esence pri interna laborkunsido, ni ne donas la alirinformojn. Se vi volas partopreni aŭ kontribui, bv. anonci vin al Mirejo.

## Indekso por la dek AMO-seminarioj en 2020




Naŭ el la dek seminarioj pri Aktivula Maturigo okazis virtuale, kiu havis la feliĉan sekvon, ke la organizanto ricevis materialon por naŭ el la dek seminarioj. Tiuj materialoj estas jam legeblaj en la retejo de UEA ĉe <aktivulo.net> en la rubriko "AMO virtuala".

Kun tia abundo da kontribuoj, indis kompili unuafoje indekson por la jaro. Ĝi ampleksas du paĝojn kaj enhavas fotojn. Ĝi estas alkroĉita en la formo de PDF.

========= vorto: 700 ========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de 2020. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.